# Kubaj studendoj esprimas solidarecajn agojn al universitataj studentoj el Usono




Havano, maj 3 (RHK) Centoj da studentoj hodia? ratifos la malakcepton de la universitata komunumo en Kubo al la polica subpremo kontra? siaj samuloj en Usono pro denunco de la krimoj de Israelo en Palestino, anoncis la Federacio de Universitataj Studentoj (FEU).

La? informo publikigita de la ?urnalo Juventud Rebelde, la mitingo okazos ?i-vendrede je la 5a horo (loka horo), sur la ?tupoj de la Universitato de Havano kaj anka? estas invititaj eksterlandaj studentoj, kiuj studas ?i tie.

Same, la Universitata Studenta Federacio (FEU) invitas al ?i tiu mitingo "laboristojn kaj ?iujn bonajn homojn, kiuj sentas sin tu?itaj kaj ne povas elteni unu minuton pli da israela genocido en la Gaza Zono".

La organizantoj de la mitingo kunvokis anka? junulojn el aliaj nacioj, kiuj estas en Kubo, kadre de la aktivadoj por la 1-a de majo, kiuj  faros deklarojn favore al la menciitaj ka?zoj, raportis la kuba junulara ?urnalo.

En la evento ili levos sian vo?on "energie  favore al la nobla afero de la palestina popolo kaj kontra? la polica subpremo al kiu estas submetataj usonaj studentoj", diris José Alberto Almeida, prezidanto de la FEU en la Universitato de Havano.

Almeida rekonis, ke la studentoj de la norda lando havas la dignon alfronti kaj manifestacii kontra? la barbareco de la cionisma registaro de Israelo kaj, tamen, en la tiel nomata lando de "libereco", oni volas per batoj silentigi la veron, li aldonis.

Estas tempo  ?esigi ?i tiun genocidon  kaj samtempe malbloki la humanan helpon al la Gaza Zono, kiu konsistigas flagran malobservon de la homaj rajtoj de la palestina popolo, postulis la studenta gvidanto de la insulo.

La agado de la universitataj studentoj de la ?efurbo ali?as al la deko da mobilizoj kaj eventoj, kiuj okazis ?i-?a?de en diversaj domoj de supera edukado en la kariba lando, favore al Palestino kaj al la universitataj studentoj de Usono.

La FEU kondamnis en deklaro ?i tiun 1-an de majo, la perfortan invadon de la polictrupo en la kampusoj de pluraj nordamerikaj universitatoj, kiu malka?as gravajn malobservojn de la homaj rajtoj de studentoj.

La organizo atentigis, ke en la lando supozeble defendanto de demokratio kaj homaj rajtoj, ili krimigas studentajn protestojn kaj ordonas al siaj policaj fortoj subpremi instruistojn kaj studentojn, kiuj petas ?esigi la amasmurdon de gazanoj kun la kunkulpeco de la usona registaro.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/353793-kubaj-studendoj-esprimas-solidarecajn-agojn-al-universitataj-studentoj-el-usono

**Radio Habana Cuba**